

\*\*\*\*\*

## INSTRU-CIRKULERO 2012/1 (majo 2012)

### Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

\*\*\*\*\*

Karaj Gekolegoj,

rapide flugas la tempo kaj jen baldaŭ nia sekva jarĉefkunveno dum GEK (KEK) 2012 en Berlin.

## JARĈEFKUNVENO

### Invito al jarĉefkunsido de AGEI

La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn membrojn al la ĉiujara ĉefkunsido, organizata enkadre de la 89a Komuna dana, germana kaj pola Esperanto-Kongreso (<https://esperanto.de/kek2012>) en Berlin inter 25a-28a de majo 2012.

La kunveno okazos inter 16:00-17:30, la 26an de majo, 2012 en Orangerie, DE-10365 Berlin, Schulze-Boysen-Straße 38.

#### Proponata tagordo:

1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo. Elekto de protokolanto, kontrolo de laŭstatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Senŝarĝigo de la estraro
5. elekto de la estraro
6. pluaj aktivecoj kaj proponoj
7. laborplano por la sekva agadjaro. Decido pri loko kaj dato de sekva jarĉefkunveno.
8. diversajoj

Krom la raportoj pri la antaŭa jaro ni planas diskutojn pri estonta agado. La estraro esperas je ĉies aktiva partopreno.

### **Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung**

Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung im Rahmen des 89. dänisch-deutsch-polnischen Esperanto-Kongresses (<https://esperanto.de/kek2012>) in Berlin ein.

Diese findet am Samstag, den 26. Mai 2012 im Kongresshaus: Orangerie, DE-10365 Berlin, Schulze-Boysen-Straße 38 statt. Beginn ist um 16:00 Uhr.

#### Vorgesehene Tagesordnung:

TOP 1: Wahl des Sitzungsleiters. Begrüßung und Eröffnung. Wahl des Protokollanten.

Feststellen der ordnungsgemäßen Einladung und Beschlussfähigkeit.

TOP 2: Feststellen der Tagesordnung.

TOP 3: Kassenbericht. Bericht der Rechnungsprüfer.

TOP 4: Bericht des Vorstands. Entlastung des Vorstands.

TOP 5: Wahl des Vorstands


TOP 6: Sonstige Aktivitäten und Anträge, soweit bis zur Sitzung eingereicht

TOP 7: Arbeitsplan für das neue Vereinsjahr. Ort und Zeit der nächsten Mitgliederversammlung

TOP 8: Verschiedenes

Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht.

Koran bonvenon!



Zsófia Kóródy

AGEI-prezidanto / AGEI-Vorsitzende

## JARRAPORTO

La jarraporton pri la agadjaro 2011 mi sendis ĝustatempe al ILEI kaj afiŝis ĝin sur la AGEI-hejmpaĝo. Vi trovas ĝin sub Dokumentoj en pdf versio. En aprilo okazis kaskontrolado.

<http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652>

## MEMBRARO

Ni dankas al ĉiuj membroj, kiuj remembriĝis en 2012 kaj kore salutas kelkajn novajn membrojn. La aktuala membronombro estas 93, tiel AGEI estas la plej granda landa sekcio de ILEI.

Por novaj membroj aliĝilo troviĝas ĉe la AGEI-retpaĝo <http://esperanto.de/agei> sub menupunkto Aliĝo aŭ petu tion de mi. Viajn demandojn pri membriĝo, kotizado bv. sendi al nia kasisto: Christoph Krick, Gunninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, [christof.krick@esperanto.de](mailto:christof.krick@esperanto.de)

## KLERIGADO, PLUKLERIGADO

### 1. KVHS-kurso (Bildungsurlaub) 5-9 marto 2012

Post la unua sukcesa kurso en 2011 ni denove ofertis klerigcelan intensan Esperanto-lernadon (Bildungsurlaub) en Herzberg am Harz. Tiun oficialan lingvokurson organizis Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg kun la popolaltlernejo KVHS Osterode inter 5-9 marto 2012. Ĝi taŭgis ne nur por komencantoj kaj progresintoj, kiuj povis lerni en apartaj grupoj, sed ankaŭ por tiuj, kiuj interesiĝas pri instruado kaj volis spertiĝi pri metodiko dum 40 instruhoroj gvidataj de Zsofia Korody kaj Peter Zilvar. Partoprenis ĝin 10 personoj venintaj el tuta Germanio. Mallongan raporton kun fotoalbumo vi povas vidi ĉe [http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog\\_id=22802713](http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=22802713)

### 2. KVHS-kurso (Bildungsurlaub) 4-8 marto 2013

Post la bonaj spertoj, sukcesaj kursoj ni denove ofertas tiun formon de lingvolernado, plenkreskula pluklerigado. Aliĝu ĉe Interkultura Centro Herzberg, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6 [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de) aŭ/kaj ĉe KVHS Osterode <http://www.kvhs-osterode.de> Detalojn, sciindaĵojn pri "Bildungsurlaub" bv. legi ankaŭ sur la ĉefpaĝo de GEA, alklaku supre la butonon "Bildungsurlaub". La rekta adreso estas <http://esperanto.de/gea/bildung.html>

### 3. ESPERANTO 125

Ni povas ĝoji, ke pluraj kluboj, asocioj eluzas la bonan momenton por varbado kaj per tio aliĝas al la internacia kampanjo de ILEI kaj UEA (iniciatite de Stani Rynduch) por digne festi tiun jubileon de la lingvo. Jam aperis kelkaj gazetartikoloj, raportoj, intervjuoj pri la lingvo kaj la movado okaze de la 125a jubileo. Tio montras, ke estas baza interesiĝo pri nia lingvo, kulturo, sed ni mem devas iniciati agadon, informadon.

Varbtekstojn, ekzemplodonajn alvokojn al KVHS-kursoj, kajeroj vi povas legi ĉe <http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652> (al nerethavantoj mi volonte sendas kopiojn) Dum la IFEF-kongreso en Herzberg okazos komuna IFEF-ILEI seminario sub gvido de Stefan MacGill, kiu ellaboris apartan instrumaterialon por fervojistoj kaj prezentos, kiel plej bone, efike instrui ĝin. La priskribo de la programo kaj detaloj pri la dumkongresaj sesioj estas troveblaj ĉe <http://ifk64.esperanto-urbo.de/page.php?pid=60381095>

#### Datoj de la sesioj:

1. 19.05.2012 (sabato) 16.00-18.00 (sesioj 1-2)
2. 20.05.2012 (dimanĉo) 14.30-16.00 (sesioj 3-4-5)
3. 21.05.2012 (lundo) 14.00-17.00 (sesioj 6-7-8-9)

#### 4. SOMERA INTENSA KURSARO, TREJNADO EN HERZBERG (Esperanto 125)

Okaze de la 125-jara jubileo de Esperanto – inter 13-20 kaj 20-27 julio estos someraj staĝoj en Herzberg am Harz. La du-semajna kursaro ofertas tre intensan lingvolernadon kaj traktos la postulojn de la unujara instrukapabla kurso de ILEI-UAM (Adam Mickiewicz Universitato en Poznan, PL). Ĝi bone preparos la aliĝintojn, kiuj strebas je diplomo pri Esperanto-instruado kaj kiuj ŝatus trapasi la finan ekzamenon, kiu povos okazi ekz. post unu jaro, en julio 2013 dum la ILEI-konferenco en Herzberg am Harz.

125 EUR por 2-semajna trejnsesio! Detalojn, kondiĉojn legu ĉe  
<http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=80022548>

Subvenciado far GEJ, AGEI kaj ILEI: vi povas peti financan subtenon por la partopreno. Skribu al mi!

#### 5. KLERIGKURSOJ, STUDESIOJ ĈE GERMANA ESPERANTO-CENTRO EN HERZBERG

La ofertoj de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo ankaŭ en 2012 estas regulaj kaj zorgas pri la instrukapabligo, movada trejnado de la kurspartoprenantoj: metodiko, literaturo, gramatiko, lingvistiko, interlingvistiko, Esperanto-kulturo, informado, varbado, tradukado, ktp. estas en la temaro.

Detaloj: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=61311937>

Jarkalendaro por 2012: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910>

#### Datoj de studmoduloj por faka klerigado, pluklerigado, instrukapabligo ĝis la jarfino:

**junio 15-17:** 55a Studsesio

**julio 13-20:** Esperanto 125: Intensa lingvo- kaj instrukapabligo kurso laŭ la ILEI-normoj. Staĝo 1

**julio 20-27:** Esperanto 125: Intensa lingvo- kaj instrukapabligo kurso laŭ la ILEI-normoj. Staĝo 2

**septembro 13-16:** Traduksemajnfino, projekto Nacia Parko Harz, migrado en la Harz-montaro

**septembro 28-oktobro 03:** TORPEDO-8 (Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia):

pedagogiaj tagoj, prelegoj, metodika spertinterŝanĝo, 56a Studsesio (studmodulo kun specialaj ofertoj por instruemuloj)

**decembro 14-16:** 57a Studsesio (studmodulo kun Zamenhof-festo)

#### KUNLABORO

Tre fruktodona kunlaboro estas jam la duan fojon praktikata inter la Universitato Emden kaj Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto-Centro. En ĉiu semestro estas nuntempe dekoj da studentoj, kiuj lernas tie Esperanton sub la gvido de Sebastian Kirf (iama trejnito de ICH/GEC). La studentoj ricevas kreditpoentojn ne nur pro la partopreno en lingvokurso sed ankaŭ pro partopreno en aliaj Esperanto-klerigseminarioj, kulturcelaj aktivecoj, ktp.. Do vizito al la Esperanto-biblioteko, studado en la Esperanto-urbo taŭge aldoniĝas al la studprogramo kaj donas al ili enrigardeblon en la Esperanto-movadon, spertiĝeblon en Esperanto-medio.

La unua vizito okazis en novembro 2011 kaj la dua je la fino de aprilo 2012.

La Esperanto-Centro (kun sidejo de AGEI), la ordigita biblioteko kun speciala pedagogia-metodika faklektaĵo estas je dispono por ĉiuj lernemuloj, studemuloj.

#### KER-EKZAMENOJ

**07-10.06.2012** en Herzberg okazos intensaj lingvokursoj en pluraj niveloj, preparo al KER-ekzamenoj

**09.06.2012:** La unuan fojon okazos tutmonda ekzamensesio laŭ la postuloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Eblas trapasi la ekzamenon en la niveloj B1, B2 kaj C1. En 29 ekzamenlokoj dise en la tuta mondo samtempe okazos skribaj ekzamenoj.

En Herzberg ankaŭ la parola parto estos trapasebla, ja Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy estas rajtigitaj ekzamenantoj.

Aliĝo ankoraŭ eblas ĉe <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Vidu la aktualajn informojn ĉe: <http://edukado.net/novajhoj?id=244>

## ALVOKOJ, DANKO

### 1. Junulara renkontiĝo en München:

zwischen dem 1. bis 15. August 2012 findet eine europäische Jugendbegegnung in München statt. Es werden ca. 40 Jugendliche u. a. aus Russland, der Ukraine, Weissrussland und Bosnien an dem Treffen teilnehmen.

Für eines der Wochenenden 4/5 oder 11/12 August wird nun ein Esperanto-Lehrer gesucht (möglichst 4/5). Noch besser wäre es natürlich, wenn die entsprechende Person am ganzen Treffen (oder zumindest der ersten Hälfte) teilnehmen könnte.

Ich bitte um Kontaktaufnahme mit Esperantst (x) gmail.com

Grüße, Martin Schäffer

2. Informado, statistiko: bonvolu helpi min per sendado de informoj pri viaj kursoj, via instru-agado. Via raporto, via ekzemplo povos esti interesa kaj utila por aliaj gekolegoj, samfakuloj. Informojn – se vi uzas interreton – vi povas mem rekte sendi al la korespondlisto [instru-german@googlegroups.com](mailto:instru-german@googlegroups.com). Aliaj bv. sendu per poŝto novaĵojn, interesaĵojn al mi kaj mi dissendos tion per nia dissendo-sistemo.

Mi petas ankaŭ tiujn, kiuj instruas oficiale en lernejoj, universitatoj, ktp. bv. registri vian kurson ĉe <http://edukado.net/kursejo>. Ofte demandas ĵurnalistoj, aŭ ni bezonas por artikoloj, ktp. freŝajn informojn pri institucia instruado de Esperanto.

## ILEI-KONFERENCO

20-26 julio 2012: ILEI konferencos en Ĉinio dum la semajno antaŭ la UK en Hanojo.

Konferenca urbo: Kunming, provinco Yunnan en suda Ĉinio.

Konferencejo: Profesia Artkolegio de Kunming.

Loĝado kaj manĝoj: En hotelo ene de la Kolegio. Eblas elekti loĝadon ankaŭ en pli luksa hotelo en la urbo.

Transporto al Hanojo por UK: Flugo 1,5 horojn, aŭ

Tuttaga postkonferenca ekskurso per buso ĝis la vjetnama landlimo + litvagonare ĝis Hanojo

Konferenca temo: La arto de komunikado, komunikado de artoj

La Kunminga Artkolegio disponigas la ĝustan medion por konferenci pri la graveco de artoj por edukado al la kulturo de paco, al estimo de la homo kaj al respekto de la naturo.

Informoj, aliĝilo, detaloj: <http://ilei.info>

Komitatkunsido, novelektoj

Dum la konferenco ĉi-jare okazos novelektoj de la estraro de ILEI. Mi mem ne povos partopreni, nek laŭ mia scio aliaj komitatanoj de AGEI planas veturi al Ĉinio. Mi petas gekolegojn, kiuj veturos al la ILEI-konferenco, bv. anonci sin, ke ni povu transdoni rajtigon je reprezentiĝo.

## MEMBRIĜO, ABONOJ, ELDONAĴOJ

Membreco – AGEI kun IPR papera aŭ reta 25 EUR

Juna Amiko - jarabono 16 EUR

JA ekde 3 ekz. al la sama adreso 13 EUR


Pakaĵeto de malnovaj jarkolektoj de JA 7-9 EUR (depende de jaro) plus 10% por sendokostoj

Detala gramatiko de Bertilo Wennergren 12 EUR plus 10% por sendokostoj

Manlibro pri instruado 8, 50 plus 10% por sendokostoj

Listo de eldonaĵoj: <http://ilei.info/agado/eldonado.php>

Anticipan dankon por via membriĝo, abono, subteno!



Zsófia Kóródy

AGEI-Vorsitzende

AGEI-prezidanto